## POR LA PROSPERO DE "BONA ESPERO"

Konata, malnova slogano! Sed ne tiel malnova kiel Bona Espero.

La 14.7.1957 subskribis 5 brazilaj esperantistoj kontrakton, kiu destinis areon de 500 ha en la federacia ŝtato Goias al la projekto de lernejo-bieno. En la konstruendaj domoj loĝu orfoj el la mizerulaj kvartaloj de la grandurboj. Ili ricevu hejmon kaj bazan instruon por poste mem vivteni sin. Post kelkaj jaroj pli ol duobliĝis la posedaĵo kaj konstante dudeko da gejunuloj sentis tie protekton kaj sekurecon - almenaŭ por kelkaj jaroj. Ĉe ni en Eŭropo apenaŭ iu sciis pri la karita laboro de niaj samlingvanoj. Eĉ en Brazilo ĝi ne estis vaste konata. Nur kiam Ursula kaj Guiseppe Grattapaglia translokiĝis el Italio al Bona Espero, ankaŭ multaj el ni konatiĝis kun tiu fora ponteskarpo de nia movado. Dum siaj vizitoj, ligitaj al la UEA-Kongresoj, ili tiel entuziasmige rakontis pri la libera vivo en la netuŝita savano, ke aro da vizitantoj venis por kunlabori certan tempon, eĉ provi, ĉu eblas daŭre resti tie. La deziron fuĝi el nia tro perfektigita civilizacio ni ĉiuj komprenas. Kiel dependaj ni tamen estas, montriĝas, se absolute mankas niaj kutimaj mekanikaj helpoj. Ekzemple sen kurento ne nur mankas la agrabla heligo dum krepusko, ankaŭ lavomaŝino kaj gladilo, fridujo kaj forstigilo, kuirejaj kaj metiistaj maŝinoj havus tiam nur dekoran funkcion. Ankaŭ ĉiutaga gazeto, televido, telefono kaj aliaj komunikiloj montriĝas necesaj, kiam ili ne ekzistas. Se ĉarmaj papagoj ŝtelas la kompletan rikolton de tomatoj kaj sovaĝaj bovoj detruas la plantojn en la legomĝardeno, ĉar flegmaj helpantoj ne ĝustatempe riparis la barilojn, insultoj nenion plibonigas. Se infanetoj, kiuj jam pasis la danĝeran unuan jaron tamen mortas je intestmalsano, ĉar mankas kuracisto kaj malsanulejo por doni la vivosavan infuzaĵon, tiam ne sufiĉas nura obstino por tamen daŭrigi. Necesas la firma konvinko, ke "guto post guto, post longa laboro...." tamen pliboniĝos la vivkondiĉoj en la regiono ĉirkaŭ BONA ESPERO!

Kelkaj gravaj ŝanĝoj jam okazis en la lastaj jaroj. La novan lernejon konstruis, dank' al financa helpo de Terre des Hommes, eksterlandaj junaj esperantistoj kune kun ĉiuj "Bonesperanoj"

Ĉiuj pontoj estas novigitaj aŭ riparitaj, tiel restas la kontakto al la cetera mondo ankaŭ dum la pluvotempo.

Pro insista petado de germanaj esperantistoj MISEREOR financas la novan traktoron; la malnovas jam ne funkcias dum pli ol jaro.

b.t.

.............................................................................................

Mi volas subteni nian evoluprojekton Bona Espero (registrita societo)
Ich möchte unser Entwicklungsprojekt Bona Espero e.V. unterstützen

Mi fariĝos membro de la societo kaj pagas
Ich werde Mitglied des Fördervereins und zahle

monate / monatlich ________ jare / jährlich ________

familia nomo / Name ........ vornomo / Vorname ........ subskribo/ Unterschri

strato / Straße ........ poŝtkodo/PLZ ........ loko/ Wohnort

28 infanoj nun ricevas bazan instruon tie pere de tri brazilaj instruistinoj. 22 restas dum la lerneja jaro konstante en Bona Espero. Iliaj familioj loĝas en ĉirkaŭo de 80 km. Tiuj etuloj, 5- ĝis 13-jaraj, ne nur lernas skribi kaj legi. La tutan bazan scion pri saniga nutrado, higienio, ĝardenkulturado kaj dumpurigado ili akiras en BE kaj kiel etaj multplikatoroj transdonas al siaj propraj familioj. Imagu, ke pli ol 200 infanoj trapasis tiun unikan lernejon. Ni helpu ebligi tion al pluraj centoj.
Sed baldaŭ disfalos la malnova kamioneto. Ĝi estas nepre necesa por transporti la enloĝantojn de Bona Espero al Alto Paraiso, vilaĝo 20 km for, la plej proksima aŭtobus- kaj poŝt-stacio. Ankaŭ por konstrumaterialo kaj la transporto de lerneja nutraĵo, multaj paketoj el eksterlando devas esti veturilo. La ŝtata subvencio restas egale malalta. La financa kaj materia helpo ne sufiĉas por nutri la infanojn kaj havigi lernilojn. Ankaŭ la kontribuo de la brazilaj esperantistoj ne [illegible] plu[illegible] la fin[illegible] bazon de nia "evoluprojekto".

## NIA EVOLUPROJEKTO

Centoj el ni jam subtenis dum la pasintaj jaroj la laboron en Bona Espero - finance aŭ materie, pli malpli regule. Ĉar ofte mankas aktualaj informoj kaj daŭra kontakto. Bazaroj kaj kolektoj atentigis jen kaj jen pli vaste, ke vivas kaj prosperas BE, sed aktivecoj rapide laciĝas kaj ni ĉiuj ne volonte ĉiam denove petadas. Estas malagrable por ni kaj ankaŭ por niaj protektatoj. Tion ni ekkonis, priparolis kaj agis:

Ek de la 24.3.1981 ekzistas la registrita societo: BONA ESPERO e.V. La fondkunvenon en Telgte ĉeestis 14 membroj de la Esperanto-societoj Münster kaj Osnabrück krom lokaj subtenantoj. Ili akceptis kaj subskribis la statuton kaj elektis Margret Brandenburg, Henriette Otto, Ursula Schrapp kaj Adelheid Holtmann estraranoj. La financoficejo Münster agnoskis ĝian komun-utilecon.

Membroj pagas minimuman monatan kotizon de 5,--gm

Subtenantoj pagu laŭ siaj kapabloj.

Membroj ricevas kopion de la statuto kaj almenaŭ du fojojn jare novaĵojn kaj aliajn informojn pri Bona Espero.

Membroj ricevas kvitancon por la financoficejo post la jarfina kalkulo, same subtenantoj, kiuj pagis pli ol 50,--gm dum la jaro. Por pli malgrandaj sumoj ni sendas kvitancon laŭ deziro.

Bankkonto: Sparda-Bank, MÜNSTER (Westf), BLZ 400 605 60
Konto-nr. 900 826 Bona Espero

Al Sparda-Bank vi povas ankaŭ ĝiri per poŝtĉekkonto 5732-465 Dortm[illegible]
(favore al Kto n-ro 900 826 BE)

Aliĝilon sendu al: Margret Brandenburg, Brinker Damm 23
D-4404 TELGTE